# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**




**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**




PLENUMITA 22/09/2022 Sescenta eldono (unua eldono 20/09/2011)


## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

# La numero 601



## Gratulon al la Aŭstraliaj Esperantistoj

**20/9/11 estas la dato de la unua eldono de "Aŭstraliaj Esperantistoj."**

**AE-a naskiĝtago! 20a de novembro 2011**

# Nun dekunuaj jaroj forpasis.


**(AE001 ĝis AE601) Sen manko de eĉ unu semajna elsendo**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" atingeblas je la suba adreso**


Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute **683,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **298,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **156,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **137,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **92,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio

17-a de septembro 2022 Donas bonan Ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon. Ĉiun tagon

**Malsamaj encerbaj interligoj de viroj kaj virinoj**



# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

**EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**
**N.ro 2 de "Por Komencantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Tri el la kvar partoj de propozicio (= frazo) estas la subjekto, la objekto, kaj la adjektoj. Kiu estas la nomo de la kvara parto de propozicio?
2). En tiu kvara parto de propozicio, kia vortspeco estas deviga, kaj kiuj ne?
3). Kiu parto de propozicio ricevas la akuzativan finaĵon "-n", kaj kiu parto povas ricevi la "-n"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 601. *Marcel Leereveld.*

**Elkoran gratulon** al vi Roger pro la 600a ekzemplero de Australiaj Esperantistoj. Mi vere admiras vian celon, vian persistemon kaj vian sukceson, kvankam certe helpata de via kara ĉina kunulino kiun mi ankaŭ bone memoras. Bedaŭrinde mi parte perdas mian karan edzon, Alan, ĉar pro malfunkcio de diversaj sed necesaj vivkapabloj li nun loĝas ĉe apuda varthejmo.

Dezirante al vi longan kaj valoran kaj aktivan vivon,
salutas daŭre subtenanta leganto, *Jenny Bishop*



Karaj,

La limdato por la dua Interkultura novelo-konkurso estas la fino de Septembro. La temo estas nokta vojaĝo, vidu https://www.akademio-literatura.org/ink-2




Partoprenu kaj vi eble ricevos belan diplomon kaj senpagan libron, en kiu estas via novelo. Amike, *Nicole Else*




**Jen bonega materialo por instrui Esperanton, senpage elŝutebla.**

https://lernu.net/instruado Amike, *Nicole Else*



# Georgiaj Gvidŝtonoj Definitive Detruitaj!

almenaŭ el unu aŭstralia arkivo? la 16an de septembro 2022



## '*Stonehenge* de Usono' disfaligita post eksplodo.

Mia videoprezento por Aŭstralia Esperanto-Asocio mistere malaperis aŭ mirakle, ĉu mistifike, suferis detranĉon: https://esperanto.org.au/anzek2022-programo.html#verkoj Vidu en la mateno de la oka de januaro, 2022. C'est la vie, mes amis! Ne tamen zorgu; ĉi tiu amatoro konservis dosieron: https://www.bandeeducation.com/sidnejo_2022_esperantlingve

Nek falsaj novaĵistoj nek sabotistoj sukcesos eterne en Esperantujo: *Georgia Guidestones Gone,* la 6-an de julio 2022! https://www.youtube.com/watch?v=VtDTClVctJE

Antaŭ ol ĝi estis detruita, la ses metrojn alta monumento konsistis el unu vertikala slabo en la centro de kvar pli grandaj slaboj aranĝitaj ĉirkaŭ ĝi, kun granda rektangula ĉefŝtono metita sur la aliajn. Por savi la mondon, gekaraj! Sur granita monumento ĉizita de modernaj kaj antikvaj lingvoj avertas la homaron usonaj anonimuloj rapide senhomiĝi ĝis nura duonmiliardo da homoj. La kolekto de grizaj monolitoj estis starigita en 1980 en la mezo de granda kampo proksime de la urbo Elberton, Georgio, de Highway 77, Usono.

La intrigo komplikiĝas pli ol kvardek jarojn poste: "Disfaligu la Georgiajn Gvidŝtonojn" vortigas Kandiss Taylor, aktivulo por la Georgia GOP (Grand Old Party), La Respublikana Partio: https://www.reuters.com/article/factcheck-georgia-guidestones-idUSL1N2YS1PO Lerninte tamen pri bombado de la Gvidŝtonoj, Taylor sugestis en Tvitero ke detruo de la monumento estis ago de dia interveno. "Dio estas Dio tute sola. Li povas fari ION, kion Li volas fari. Tio inkluzivas forbati Satanajn Gvidŝtonojn." Kia koincido ke nur hieraŭ danke al aktivega esperantisto mi eklernas pri la sorto de tiu fama monumento pri kiu mi rakontis kadre de nia ĉi-jara Kongreso en januaro! Vidu sur paĝo 12 (afable disponigita de Ian Fantom de Unuiĝinta Reĝlando) la artikolon de Christopher Sparkes pri kiel travivi fintempojn kaj sur paĝo 19 poresperantan eseon de Ian mem: *New initiative to combat hysteria of war* (Nova iniciato kontraŭbatali histerion de milito): https://thelightpaper.co.uk/assets/pdf/Light-25-Web-Final.pdf

Aldona afero kiu tre rilatas al nia Movado aperis lastatempe: Profesorino Ingrid Pilger Ph.D. alŝutis siajn iomete kaŝitajn opiniojn pri la estonteco de la angla lingvo. La rekomendinda eseo de fama poliglotо verkita efikis min prezenti kontraŭan opinion, kiun ŝi brave publikigis: **https://www.languageonthemove.com/whats-next-for-the-queens-english/** ŝia multe elalborigita analizo tamen ne penas taksi la prestiĝon de la angla lingvo en post apokalipsa mondo.



*Paul Desailly*

Gratulojn, kara Roger, pro sescenta mejloŝtono de *Aŭstraliaj Esperantistoj*

**Feliĉan 601-an *AE*!** Gratulojn kaj sincerajn dankojn al Roger, kiu fidele kaj senĉese vin prizorgis dum pli ol 11 jaroj. Kresku kaj prosperu, per la nutrado de viaj bonvolaj kontribuantoj kaj la daŭra persisto kaj laboro de nia eldonisto, Roger Springer.



*Vera Payne*

## Pri regionaj lingvoj

Vidante la frazojn skribitajn sur la busoj BreizhGo de la btretona regiono, mi tuj rimarkis ke io ŝanĝiĝis en la nuna lingva politiko . Delonge aperis sur stratoj en Bretonujo ŝildoj en ambaŭ la franca kaj la bretona lingvoj, sed nur ĉijare vidis mi skribaĵojn ankaŭ en la loka lingvo: la “galla” ( gallo). Ĝi estas lingvo kies deveno similas tiun de la franca . Pro tio kiam mi estis infano, la galloparolantoj estis konsiderataj kiel kamparanojn kiuj ne kapablis ĝuste france paroli , do ili misformigis ĝin. Jam en 845 Charles Le chauve venkis en la batalo de Ballon kaj regis en la orienta parto de Bretonujo, kie la galla lingvo estas parolata, dum nur en 1491 pro la geedziĝo de Anne de Bretagne kaj Charles VIII ankaŭ la cetero, la okcidenta parto, kie la bretona lingvo estas parolata, fariĝis franca.




Ĝojigas min la rekono de tiu lingvo ,Neniu plu devas honti pro tio ke li/ŝi galle parolas . Finfine ĝi havas la lokon, kiun ĝi meritas



*Franciska Toubale*

Rannvro Breizh : en la bretona     la rejion Bertègn : en gallo     région Bretagne : en la franca

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). La predikato.
2). Deviga estas verbo, kaj nedevigaj estas infinitivo kaj predikativo.
3). La finaĵo “-n” estas deviga por la objekto kaj nedeviga en la adjektoj. *Marcel Leereveld*



Venis Charles por konsulti sian kuraciston.
“Kio maltrankviligas vin?” demandis la kuracisto.
“Doloras kiam mi tuŝas mian kruron” diris Charles. “Kaj ankaŭ kiam mi tuŝas mian brakon kaj mian kapon, tio treege doloras, eĉ doloregas”.



“Mi eĉ tre bone komprenas” respondis la kuracisto. “Laŭ mia opinio vi akcidente rompis al vi vian fingron!” *Bob Felby*

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



## Subdividoj. RESPONDO AL LA KOMENTO DE PETER WEIDE.

Mi dankas cin, Peter, pro la komento. Mi esperas ke ci respondos al mia sekvanta demando pri la temo. Mi komprenas, ke ci ne deziras kompari familion kun lando. Sed ni certe samopinias, ke la plej multaj landoj, nacioj, estas subdividitaj en ĝenerale (sed ne ĉiam) samrajtajn partojn kiujn la nederlanda lingvo nomas "provincoj" kaj kiujn estras la nacia registaro (commonwealth). Preskaŭ ĉiam ĉi lasta ne permesas iun provincon eliri el la nacio, kaj uzus eĉ forton por repreni foriĝintan provincon (vidu Hispanujon, Francujon, k.t.p.). Mia demando estas "Ĉu ci opinias ke la nacia registaro rajtas malpermesi al provinco eliri, aŭ rajtas zorgi ke tia forlasinta provinco retrovenu al la nacio".

Antaŭ sufiĉe longa tempo la provinca registaro de Vestralio decidis, ke ĝi deziras memstariĝi kiel nacio kaj ne plu esti parto de Aŭstralio. La respondo de la Commonweaŭlth-registaro estis, ke ĝi ne permesos tian foriĝon. La vestralia registaro daŭrigis havi la forirdeziron kiel daŭran leĝon, sed (ankoraŭ) ne decidis praktiki la malkuniĝon. Kiam ĝi fine eble faros tion, la devo de la nacia registaro estas fari ĉion kion ĝi povas, eĉ milite, por repreni la antaŭe aŭstralian parton de la nacio. Ĉu ci helpos la vestralian registaron aŭ ĉu ci helpos ke la foririnta provinco refariĝu aŭstralia? Simile situas la kazo de Tajvano (Formoso), kiu antaŭe estis provinco(j) de tuta Ĉinujo. Kaj ankaŭ Ukrajno kun Rusujo, kaj aliaj. Se ci opinias, logikpruve, ke mi malpravas, bonega, kaj se ci opinias ke mia logiko pravas, ankaŭ bonega. *Marcel Leereveld*.

# Vojaĝo per aŭtomobilo laŭ la vojoj de akvofaloj (Waterfall Way)

La vojoj de akvofaloj sin trovas inter Armidale kaj Bellingen, proksime al Coffs Harbour en NSW. Antaŭ nelonge mia edzino kaj mi iris de Armidale, veturdirekto al la marbordo.

Apud la vojo ni vizitis 9 akvofalojn, sed ekzistas ankoraŭ pli da ili. La Wollomombi estas la plej alta el ili (480 metroj), falanta tra 335 metroj en unu plonĝo. Plue, la altaj partoj de la montoj laŭ la vojo estas la plej altaj norde de la Alpoj en Aŭstralio. De kelkaj observejoj ĉe Lookput Point kaj Griffiths Lookout, oni spertas larĝegajn longajn vidaĵojn de la montoj kaj valoj.



Eta parto de la vidaĵo de Point Lookout




Wollomombi kaj Chandler Akvofaloj

Kiam ni faris la vojon venis malvarma vetero, kaj unu vespero en Armidale, neĝis. Kiam ekneĝis eĉ la servistino en la restoracio kie ni manĝis ekkriis "Ho, ĉi tio estas tre ekscita!". Kompreneble, por ni Kvinzlandanoj, estis eksterordinara okazo. Ankaŭ dum nia vizito ĉe Lookout Point, la temperaturo estas ankoraŭ sub nulo kaj ventis sufiĉe forte, kaŭzante glacierojn fali de la arboj. Menciinda ankaŭ estas la Skywalk (ebla traduko "promenado de arbopintoj"?) en la Dorrigo National Park de kie oni ĝuas panoramajn vidojn ĝis la marbordo. Ĉi foje ni havis bonŝancon faris la vojaĝon post ke pluvis sufiĉe, sed aliajn fojojn kiam ni estis tie kelkaj el la akvofaloj estis preskaŭ sekaj aŭ eĉ tute sekaj. Estis tre ĝuinda


Dangar Akvofalo ĉe Dorrigo



Dangars Falls (183 metroj)proksime al Armidale



Skywalk ĉe Dorrigo



Jen kontribuaĵo pri antaŭnelonga aŭto-vojaĝo kiun mi faris kun mia edzino

*Doug Eising*

